

Loĝado kaj manĝoj

La interna hotelo de la kolegio certigas la bezonatan komforton por la konferencanoj en dultaj kaj trilitaj ĉambroj kun: banĉambro kaj necesejo en ĉiu ĉambro, littukoj, bantuko kaj mantuko, televidilo, varma akvo inter la 7-a kaj 10-a horoj matene kaj 19-a kaj 24-a horoj vespere. Eblas mendi dultan ĉambro por unu persono. Matenmanĝo, tagmanĝo kaj vespermanĝo estos disponigataj memserve en restoracio de la Artkolegio kaj konsistos el 20 pladoj, inter kiuj pluraj estos vegetaraj. Konferencanoj ne kutimiĝintaj al manĝbastonetoj bonvolu kunporti sian forkon kaj tranĉilon.

Prezoj por unu persono por tranoktado kun tri manĝoj tage, ekde tagmanĝo la 20an ĝis matenmanĝo la 27an de julio:

- En tripersona ĉambro: por unu nokto 20 €, por 7 noktoj 140 €,
- En dupersona ĉambro: por unu nokto 25 €, por 7 noktoj 175 €,
- En unupersona ĉambro: por unu nokto 35 €, por 7 noktoj 245 €.

Bv. mendi retmesaĝe aŭ paperletere al la estrarano pri konferencoj indikante: la tipon de la ĉambro, datojn por kiuj vi mendas, kaj pagendan sumon. Bonvolu pagi laŭ unu el la manieroj indikitaj en la aliĝilo (IPR 11/4 p. 39 kaj <http://ilei.info/novajxoj/45Konf-alighilo.pdf>).

Por pli luksa loĝado, ni atendas hoteloferton de la turisma agentejo, por subskribi kun ĝi prian kontrakton.

Transporto

Ĉe alveno kaj foriro, la Artkolegio proponos senpagan transporton de konferencanoj inter la flughaveno de Kunming kaj la konferencejo.

Transporto el Kunming al Hanojo por UK estos organizita buse kaj trajne por tiuj kiuj ne volos flugi tien pro multekosta flugbileto. Ni atendas definitivan oferton de la turisma agentejo kun itineraj kaj prezaj detaloj. Ĉiukaze, la 27an de julio post la matenmanĝo la grupo busos el Kunming ĝis la stacidomo en la vjetnama landlima urbo LaoCai. La busveturo daŭras pli-malpli 8 horojn kun sufiĉaj paŭzoj por tagmanĝo kaj aliaj bezonoj. Poste oni daŭrigos per nokta trajno por atingi Hanojon la 28an de julio matene. Inversdirekta reveno per trajno kaj buso estos organizita por tiuj kiuj post UK revenos al Ĉinio, aŭ hejmen tra Ĉinio. Ne forgesu havigi vjetnaman vizon se ĝi estas postulata por vizitantoj el via lando.

Por uzado de la urba trafiko en Kunming mem ni ankoraŭ donos la informojn pri trafiklinioj, taksioj kaj prezoj.